

Kotizoj 2022

Karaj gesamideanoj,

Denove ĉi-jare la membraro estas malmultnombra kaj
nia klubo daŭre nepre bezonas ĉies subtenon,
sen tio ĝi riskas baldaŭ malaperi do, bonvolu nepre
membriĝi aŭ rekotizi senprokraste kaj varbi !

Do, pagante vian kotizon kaj varbante novajn membrojn, lernantojn,
vi helpos nin plu vivi kaj pli vigligi nian 114-jaran klubon.

Notu ke antaŭ nelonge ni faris kunvenon
por denove aperigi nian revuon « AKTUALA » en 2022.

Se vi havas ideojn, raportojn, artikolon aŭ alian materialon por meti en la
revuon nepre ne hezitu kaj skribu al ni : aktuala@esperantobruselo.org

Ankaŭ 2021 estis komplika jaro kun longaj periodoj de trud-hejmiĝo kiuj
plejparte malebligis niajn fizikajn kunvenojn . Bonŝance la nunaj teknikaj
rimedoj donis eblecon al ni organizi multajn Zoom-kunvenojn.

Ankaŭ kursoj okazis/as tiele. Ni verŝajne ankoraŭ estonte devos kombini la
virtualajn kunvenojn kun la fizikaj ĝis kiam tiu damna viruso estos malaperinta.

- *Ne forgesu konsulti nian [kalendaron](#) sur nia retejo, ĉe eventaservo.org kaj*
mi ankaŭ memorigas al vi ke eventoj ankaŭ estas montrataj sur nia
Fejsbuk-paĝo, ĝin ne forgesu viziti kaj aboni. Ne hezitu enmeti viajn komentojn
kaj proponojn en nia Fejsbukpaĝo : « [esperantobruselo](http://esperantobruselo.org) ».

Cetere ni havas ankaŭ diskutliston do, vizitu la grupon kaj aliĝu al ĝi :

groups.io [Esperanto-en-Bruselo](https://groups.io/g/Esperanto-en-Bruselo)

Ne forgesu averti nin se vi translokiĝis/as.

Nikolao

nikolao@esperantobruselo.org

Retejo EBG : www.esperantobruselo.org

groups.io : [Esperanto-en-Bruselo](https://groups.io/g/Esperanto-en-Bruselo)

Fejsbukpaĝo : [esperantobruselo](https://www.facebook.com/esperantobruselo)

Kotizoj 2022

Nro	Kodo	Kategorio	Kotizo	Rajtoj
ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO 2022				
11	MEM	Membro de EBG	15 €	Partopreno en la vivon de la Grupo
12	MEM-J	Membro - Junulo (< 26-jara)	10 €	
13	MEM-P	Membro - Pensiulo, senlaborulo		
14	FAK	Familia kunloĝanto	4 €	Partopreno en la vivon de la Grupo
15	+KUR	!! Aldona kotizo por kursanoj	+10 €	Kurso + materialoj
18	DVM	Dumviva membro de EBG	375 €	Membreco dum la tuta vivo (25 x MEM kotizo)
BELGAJ REGIONAJ ESPERANTO-ASOCIOJ 2022				
22	FEL	Abono al FEL-a revuo	30 €	Abono al Horizontaal" (NL/Eo)
25	A-MEM	Membro plenkreska de V.Esp-o (APE)	25 €	Plenkreskula membreco V.Esp-o (APE) kun revuo « Esperanto en Marche »
26	A-JUN	Membro juna (< 25-jara) de V.Esp-o (APE)	12 €	Junula membreco V.Esp-o (APE) kun revuo « Esperanto en Marche »
27	A-FAM	Familia kunloĝanto de V.Esp-o (APE)	5 €	Kunloĝantomembreco de V.Esp-o (APE) sen revuo
28	A-REV	Abono al V.Esp-o (APE)-a revuo	12 €	Nur la ĉiutrimonata revuo « Esperanto en Marche »
NB : APE la Valona Asocio ŝanĝis sian nomon kiu nun estas : V.Esp-o				
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO 2022				
41	SA	Simpla abonanto de "Esperanto"	45 €	Abono al papera versio de « Esperanto", la monata organo de UEA
42	Kto	Simpla abonanto de "Kontakto"	25 €	Abono al paperaversio de « Kontakto", la junulara revuo de TEJO
43	MB	Membro-Baza UEA	44 €	Membro Baza, kun reta aliro al UEA-servoj: reta revuo Esperanto, Delegita Reto (reta jarlibro).
44	MA	Membro-abonanto UEA	74 €	Membro-Abonanto, kun ĉiuj retaj servoj, kiu aldone ricevas la revuon Esperanto papere.
45	SZ	Membro de Societo Zamenhof	148 €	Membro de Societo Zamenhof, kiu volas finance apogi Universalan Esperanto-Asociacion. (2x MA)
46	DMB	Dumviva Membro-Baza UEA	1320 €	Kiel MB, sed dumvive (30x MB)
47	DMA	Dumviva Membro-Abonanto UEA	2220 €	Kiel MA, sed dumvive. (30x MA)

NOTOJ : Pagu al la bankkonto IBAN : **BE87 5230 8055 0794**, BIC : **TRIOBEBB** de la Esperantista Brusela Grupo
 Por efike subteni nian agadon, estas konsilinde membriĝi ankaŭ siajn familianojn, se ili ne kontraŭas Esperanton !
EBG peras kotizojn al APE, FEL aŭ UEA nur por siaj propraj membroj kaj ĝis plej laste la fino de Februaro!
 Ne pre indiku la celon de via pago per literaj [aŭ, se vi ĝiras elektronike, ciferaj] kodoj, ekz. « MEM+2x FAK » aŭ « 11, 2x14 »

La JARLIBRO de UEA enhavas informojn kaj milojn da adresoj.

